# ORIENTA STELO

**Oktobro 2015**

NUMBER 301 NUMERO

Orienta Esperantista Federacio — Originale fondita en aprilo 1932
Eastern Esperanto Federation — Originally founded in April 1932



**Komitato - Kontaktdetaloj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Roy Simmons | Sekretario | 01473461346 | rokeby@globalnet.co.uk |
| Barrie Murphy | Kasisto | 01702472193 | celiaandbarrie@tiscali.co.uk |
| Mark Drake | Komitatano | 02085188094 | marko.drejko@gmail.com |
| Roy Threadgold | Bultenisto | 01371850481 | roy@boydellsdairy.co.uk |


***Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.***

..............................................................................................................

## Somera ekskurso al la "malpermesita" insulo Foulness



Dimanĉon la 6an de septembro, ses anoj renkontiĝis ĉe Leigh-on-Sea stacidomo. (Iu alia, kiu ne legis sian e-poŝton, renkontiĝis nur kun si mem apud la stacidomo Shoeburyness.) Finfine ĉiuj el la sep atingis la polickontrolejo en Gt Wakering por peti la permesilon bezonatan por viziti la insulon.

La insulo apartenas al la armeo, sed la unuan dimanĉon en ĉiu monato inter aprilo kaj oktobro, eblas viziti la antaŭan lernejon, nuntempe la Heredaĵa Centro. Tie ni povos vidi mirindan kolekton de antikvaĵoj datumantaj ek de la romia periodo ĝis la 21a jarcento, montrante la historion de la insulo kaj de ĝiaj enloĝint(ant)oj.





Ni trafis ekskurson per traktoro kaj trenverturilo kaj ĉirkaŭvojaĝis la insulon. Survoje ni traveturis la duan insulvilaĝeton, preterpasis grandegajn tritikkampojn, izolajn farmbienojn kaj armilprovejojn, kaj haltis por spekti kaj sperti la antikvan vojon preter la sablejoj, "Broomway" kiu estis la sola metodo (krom boato) atingi la insulon antaŭ 1922, kiam la unua ponto konstruiĝis.
Poste ni vagis al la apuda viktorina preĝejo, nun fermita, kaj trovis tombojn de praparencaj de via bultenisto.



La tago estis suna kaj varma, kaj estis ĝojo ripozi en la muzea ĝardeno trinkante kaj babilante antaŭ ol hejmeniri.
Bonega tago por ĉiuj.

| **Aŭtuna Kunveno** | **Autumn Meeting** |
|---|---|
| **Maldono** | **Maldon** |
| Sabaton la 31an de oktobro | Saturday 31st October |
| 11atm.-5ptm. | 11 am- 5 pm |
| Friends Meeting House | Friends Meeting House |
| Butts Lane, Maldon | Butts Lane, Maldon |
| Manĝaĵo kaj trinkaĵoj provizota | Food and drink provided |
| *Babili, ludi, diskuti, lerni,promeni kaj ĝojiĝi.* | *Chat, play, learn, discuss, walk and enjoy!* |

**Novaĵo ĵus ricevita**: Ges-roj Page esperas ĉeesti kaj pretos paroli kaj respondi al demandoj pri la ĉi-jara UK en Lille, Francio.

Espereble, dum la tago en Maldono, ni lernos iom pri esperanto rilate al komputado. Via redaktoro ja bezonas tion, ĉar, tajpante la supran raporton, ĉiufoje kiam mi skribis “insulon”, aperis “insulin” sur la ekrano! Nu, kiel en infero povus scii la komputilo ke mi estas diabeta? Eble mi devus voki la kuraciston!

## <u>Kvizo</u>

Jen la unuaj vortoj de la preĝo, “Patro Nia” en kvin lingvoj. Prenu la komencliteron de ĉiu lingvo, kaj ili elliterumos alian lingvon? Kiun? Por la solvo - venu al Maldono!!

1. Pare nostra del cel, sigui santificat el teu nom; vingui el teu Regne;
   faci’s la teva voluntat, com al cel, així també a la terra.

2. Faðir vor, þú sem er á himnum. Helgist þitt nafn, til komi þitt ríki,
   verði þinn vilji svo á jörðu sem á himni.

3. Missierna, li inti fis-smewwiet, jitqaddes ismek, tigi saltnatek,
   ikun li trid int, kif fis-sema, hekkda fl-art.

4. Bab nos ti che es en tschiel, sanctifitgà vegnia tes num; tes reginavel vegnia (tar nus),
   tia veglia daventia, sin terra sco en tschiel.

5. Ati ynë që je në qiell, u shënjtëroftë emri yt. arthtë mbretëria jote; u bëftë dëshira jote,
   si në qiell, edhe mbi dhe.

